

SVENSKA  
ESPERANTO-  
TIDNINGEN

# La Espero

1993:2



## *Esperanto viglas sub la Suda Kruco!*

*Svedaj esperantistoj partoprenis someran  
Esperanto-lernejon en aŭstralia Adelajdo.  
Ĉu tie okazos la Universala Kongreso en  
1997?*

## La Espero

Organ för  
Svenska Esperantoförbundet

ISSN 0014-0694  
Majo 1993 • 81-a jarkolekto  
Fondita en 1913

**Redaktör/redaktoro:**  
Per Aarne Fritzson,  
Västertorpsvägen 154,  
129 44 Hägersten,  
tel. 08-97 47 76

**Frågor om prenumeration o.dyl.:**  
Esperanto-Centro, Brunnsgratan 21,  
111 38 Stockholm, tel. 08-11 74 34

**Ansvarig utgivare:** Leif Nordenstorm

**Utformning:** Omnibus, Tyresö

**Tryck:** Quintus, Sollentuna 1993

**Prenumeration:** 145 kr. Gåvoprenumeration till utlandet: 75 kr.  
Prenumerationsavgift för *La Espero* ingår i medlemsavgiften. Postgiro 20 12-3, Esperantoförbundet.

## Esperantoförbundet

**Adress:** Esperanto-Centro,  
Brunnsgratan 21, 111 38 Stockholm,  
tel. 08-11 74 34, fax: 08-20 72 20

**Öppettider:** Vintertid alla vardagar, men säkrast måndag och torsdag kl. 11-13 och 17.30-19.

**Postgiro:** 20 12-3, Esperantoförbundet

**Medlemsavgift 1993:**  
Direktansluten medlem 145 kr.  
Familjemedlem (utan tidning) 60 kr.  
Ungdomsmedlem (max 20 år) 60 kr.  
Medlemmar under 30 år är samtidigt medlemmar i Sveriges Esperantisters Ungdomsförbund och får dess tidning *Kvinpinto*.

## Esperantoförlaget

**Postadress:** Box 7502, 200 42 Malmö

**Besöksadress:** Möllevångsgatan 20B,  
Malmö

**Telefon:** 040-12 20 29

**Postgiro:** 578-5

**Telefontid:** 1 september-15 maj: torsdagar kl. 17-18. Skriftliga beställningar expedieras under hela året.

**Expedition:** Wivi Nilsson

**Styrelsens ordförande:** Tomas Jansson,  
Storgatan 13, 753 31 Uppsala



## DONACOJ

K.H. Persson, Motala 100. Elisabeth Jensen, Burträsk 65. William Malmsten, Göteborg 100. Tore Fors, Billeberga 300. Alice och Nils Johansson, Norrköping 200. Ann Eriksson, Boden 100. Arvid Johansson, Huskvarna 100. Harry Victorin, Arboga 100. Yngve Sörman, Johanneshov 500. A. Ekoom, Boden 100. H. Persson, Motala 100. Liisa Oterma, Stockholm 100. Via autogiro 350.

**Till minne av Karl Ljungberg:** Malte Markheden, Strömsnäsbruk 100. Sigurd Olsson, Strömsnäsbruk 300. Karl Ljungbergs sterbhus, Ljungby 200.

## INSAMLING DAR-ES- SALAAM

Anita Dagmarsdotter, Stockholm 200. E. Rytenberg, Uppsala 50. Edith Köhler, Solna 100. Martin Häggström, Norrköping 100. Börje Blom, Gävle 30. Motala Esperantoklubb 200. Kalmar Esperantoklubb 300. Skövde Esperantoklubb 200. Kerstin Kristoferson, Stockholm 500. Lunds Esperantoklubb 500. SLEA, Uppsala 500. Ulla Luin, Tyresö 200. Helsingborgs Esperantoförening 500. Birger Viggen, Stockholm 100. La Ranetoj, Stockholm 1520.

## KLUBO MIL

**Membroj ĝis nun por 1993:**

1. Sten Broman, Skövde 1000
2. Helsingborgs Esperantoklubb 1000

Novaj membroj povas aliĝi pagante SEK 1000 (aŭ pli) al pĝk 20 12-3.

## ANONCETOJ

"**Mia filino kolektas** kartojn uzatajn por telefoni en publikaj telefonbudoj. Tial mi danke akceptus malnovajn, jam uzitajn telefonkartetojn por ŝi." Nazé Christian, 12 rue de Flénu, 7390 Quaregnon, Belgio.

**Korespondi deziras** la geedzoj Elena (21-jara bibliotekistino) kaj Pavel (24-jara juristo), kiuj interesigas pri i.a. literaturo, muziko, psikologio kaj religio. Elena & Pavel Skipa, p/k 60, Omsk 644071, Rusio.

**Korespondi deziras** 25-jara studento de filozofio kaj psikologio ĉe la universitato de Kinshasa. Interesoj estas i.a. vojaĝoj, legado, religia muziko, ekologio. Emilo Malanda Nianga, Ass. de Kinshasa, B.P. 691, Kinshasa I, Zairo. Bonvolu kunsendi respondkuponojn.

**Köpes:** Enstaka värdefulla böcker (svenska, esperanto o.a. språk) och hela boksamlingar. kontakta: Tomas Jansson, Storgatan 13, 753 31 Uppsala, telefon: 018/12 73 79.

## Sommarkurs i esperanto 7-12 juni 1993

För åttonde året i följd erbjuder Karlskoga Folkhögskola kurser på fyra olika nivåer: nybörjare, fortsättare, lägre och högre konversation. **Kostnad:** 2600 kr (inkl. inkvartering i tvåbäddsrums och måltider). Billigare alternativ: 1750 kr (enklare logi). **Anmälan:** senast den 1 juni. **Kontakta:** Lars Forsman, Karlskoga Folkhögskola, Box 192, 691 24 Karlskoga, tel: 0586/503 60 vx.

Fråga även om vår esperanto-linje och 8-veckorskurser!



*Mötplatsen*

# Seminario luda kaj labora en Malmö



Jill Hillford kaj Ingrid Wärn verve provludas siajn rolojn.

La Suda Distrikto de SEF invitis al seminario pri "Ludo kaj laboro" dum semajnfino en marto. Kerstin Rohdin kaj Harold Brown gvidis la seminarion.

Harold Brown enkondukis kun pensoj pri la hodiaŭa rolo de esperanto. Sub la rubriko "Esperanto en la aktuala praktiko" ni interŝanĝis ideojn kaj spertojn pri la aktuala aktivado – kluba, individua, komerca, vojaĝa, radia, televida, ekspozicia, turnea, belarta ktp. Kiel unu fonto de diskutmaterialo ni uzis la libron *Idébok för Esperantoklubbar*, eldonita de SEF en 1992.

Se esperanto disvastiĝos, kredeble la frateca sento malaperos. Tio povas okazi ankaŭ se oni uzos esperanton pli komerce en ekz. tradukfirmaoj, turismaj entreprenoj, universitatoj ktp. Gulli Svensson tuj klarigis, ke la komerca ideo estas malnova, kaj Torsten Lund bedaŭris la ĉiutagan monan problemon.

La ŝanĝigo en la movado rimarkeblas per la malapero de kluboj kaj klubkunvenoj. Studgrupoj funkcias pli bone ol ordinaraj klubkunvenoj por tiuj, kiuj volas rapide lerni la lingvon kaj tuj uzi ĝin dum vojaĝoj kaj kontaktoj, opiniis Lisbet Andreasson. Kluboj tamen necesas, diris Bertil Andreasson. Sed sufiĉas kun tri-persona estraro por organizaĵo kaj oficialaj aranĝoj.

Eble nova vojo estus pli profita, oni devus gajni per turismo, turneoj ktp. sugestis Kerstin Rohdin. Harold rimarkigis, ke se esperanto kreskos, la kluboj estos for. Tio ne ĉagrenis al Sten Svenonius, kiu deziris edukon de multaj instruistoj. Pluraj diskutis la rolon de Pasporta Servo.

Post tiu diskutado sekvis horo kun la temo "Gazetara konferenco". Oni laboris en du grupoj. Unu aktorin grupon de esploristoj malkovrintaj novan tribon en Afriko. Anna-Greta Strönné, Gulli Svensson, Sten Svenonius kaj Per-Olof Johansson respondis demandojn de kvar ĵurnalistoj. Estis verdire stranga tribo, kaj la respondoj ridigis nin, same kiel tiuj de la dua grupo, kie Gertrud Lund, Lisbet Andreasson, Bertil Andreasson kaj Sven Strandberg ĵus ricevis nobelpremiojn pro nova medikamento. Al la ĵurnalistoj ili rakontis, ke homoj havos 150 jarojn

mem tri malĝustajn. Post prezento de la diversaj klarigoj la alia grupo devas diveni, kiu klarigo estas la ĝusta. Ĉi-foje ambaŭ grupoj estis same malsukcesaj.

Harold Brown finis la sabaton per prezento de sia propra teatraĵo "La prelego". Temis pri botanikisto, kiu rakontas pri sia vivo, sed la fino estas neatendita.

Dimanĉe la diskuttemo estis "La lingvo aktuale". Ĉu la lingvonivelo malaltiĝas? Tiu demando vekis viglan diskuton kaj multajn opiniojn, same kiel neologismoj, radikoj kaj la graveco de lingvoinstruado.



Kerstin Rohdin, Bertil Andreasson kaj Harold Brown diskutas. En la fono staras Torsten Lund.

dank' al ĝi. La temojn elpensis Harold Brown kaj la grupoj mem preparis la enhavon.

Posttagmeze ni daŭrigis la diskuton sub la rubriko "Aktualaj tendencoj en esperanto". Temoj estis i.a.: Kien esperanto? La interna ideo hodiaŭ. Ĉu de supre aŭ de sube? Ĉu la koncepto "movado" daŭre validas? "Unupersona orkestro" kiel nova imago pri esperanto. Ŝanĝigoj en la movado estos ŝanco por esperanto.

"Kiu blufas?" estas simpla ludo. Du grupoj konkuras. Ĉiu grupo ricevas vorton kun ĝusta klarigo kaj konstruas

Poste oni prezentis skeĉojn. Por certigi laŭeble plej bonan aktoradon, ni ricevis la rolojn kiel hejmtaskojn jam sabate. La skeĉo nomiĝis "La granda pordo en la ĉielo" kun la subtitolo "Skeĉo por ŝerema sanktulo kaj saviga poŝtkodo" kaj estis verkita de Stefan MacGill.

Resume: estis ege interesa kaj ludema seminario. Kerstin Rohdin, Harold Brown kaj la partoprenantoj plej sukcese plenumis la celojn, t.e. ekzercado, diskutado, amuziĝo kaj ludo.

Ann-Christine Kron Dahl

# Esperanta vizito en Aŭstralio

*En lastatempaj numeroj de La Espero ni povis legi pri vizitoj de svedaj esperantistoj en i.a. Tanzanio, Japanio kaj Ĉinio. Sube Anita Bergh kaj Agneta Emanuelsson rakontos pri ankoraŭ du foraj provincoj de Esperantujo.*

La Esperanto-klubo en Adelajdo, Sudaŭstralio, estas malgranda. Dum la pasintaj sep jaroj la membronombro tamen kreskis de 3 ĝis ĉ. 40 energiaj anoj.

## Jam tradicia somerlernejo

Inter la 11-a kaj 22-a de januaro ĉi-jare, la klubo por la tria fojo organizis la Aŭstralian Esperanto-Somerlernejon en sia urbo (ses fojojn ĝi okazis en aliaj aŭstraliaj urboj). La ĉi-jaran somerlernejon partoprenis pli ol 60 aŭstralianoj kaj 16 eksterlandanoj, kaj per tio ĝi estis la plej grandnombra ĝis nun.

La eksterlandaj partoprenantoj venis el Japanio, irano, Usono, Novzelando, Koreio, Pollando – kaj ni du el Svedio. Kompreneble ni du iris la plej longan vojon por atingi Adelajdon, sed ne forgesu, ke ankaŭ multaj aŭstraliaj esperantistoj el aliaj partoj de sia granda kontinento vojaĝis de malproksime!

## Studinstiga vivo

Ĉefinstruistoj estis la UEA-estrarano d-ro So Gilsu el Koreio kaj s-ino Vera Payne el Aŭstralio. Ambaŭ estas universitataj instruistoj en siaj hejmlandoj kaj jam instruis en la famaj someraj kursoj de la Ŝtata Universitato de San Francisko en Usono. La studprogramo estis je kvar niveloj matene kaj laŭplaĉaj kursoj posttagmeze. Vespere okazis prelegoj kaj distraĵoj en Esperanto.

Ni tre ĝuis la lecionojn, kiuj estis tre variaj, kaj la studinstigan vivon de la kolegio, en kiu loĝis preskaŭ ĉiuj kursanoj. La tempo ebligis nin konatiĝi ne nur inter ni, sed ankaŭ kun la tre ĉarma urbo, la ĉirkaŭaĵo kaj la varmega aŭstralia etoso. Krom tio la suno brilegis tre agrable dum la tuta tempo!

## Antipoda UK en 1997?

La semajnfino 16–17 januaro okazis la Aŭstralia Esperanto-Kongreso, dum kiu

oni i.a. decidis inviti la Universalan Kongreson al Adelajdo en 1997! Ĝis tiam, laŭ propra deklaro, oni tie organizos la



*Ĉu Agneta kaj Anita vidis kanguruojn, koalojn, flamingojn? Ĉu eĉ ornitorinkojn?...*

somerajn kursojn almenaŭ du fojojn! Ĉu la suno sola kapablas energigi homojn tiugrade, aŭ ĉu ekzistas alia fonto de entuziasmo? La nelacigebla Max Wearing (vicprezidanto de la Sud-Aŭstralia Esperanto-Asocieto) kaj Margaret Furness (prezidantino de la adelajda klubo kaj de SAEA) kune kun la aliaj lokaj esperantistoj konsistigas grandan forton, kaj ni estas certaj, ke ili kapablos sukcese organizi iun ajn volidan eventon!

Post la kursfino la partoprenantoj adiaŭis sin por disvojaĝi al diversaj lokoj en nia mondo. Ni mem eniris aŭtobuson kaj foriris ŝajne al la horizonto, ĉar la vojo estis rekta de marbordo ĝis marbordo tra la dezerto! Nia celo estis la plej proksima urbo survoje, Alice Springs, situanta nur 1505 kilometrojn for de Adelajdo... Ĉu ni vidis kanguruojn?

Pri tio ni rakontos aliloke kaj alifoje. Intertempe ekpreparu vin por partopreni la Universalan Kongreson en Adelajdo en 1997!

**Anita Bergh  
Agneta Emanuelsson**

# Renkontiĝo kun Kuala Lumpur

Survoje al Aŭstralio, ni haltis kelkajn tagojn en Kuala Lumpur, la ĉefurbo de Malajzio. La urbo surprizis nin per siaj belaj, diversaspektaj nubskrapuloj (ŝajne, kaj ankaŭ fakte, atingeblaj nur aŭte) kaj per la hom-svarma strata vivo de la ĉina kvartalo. Komerco, konstruado – ĉie okazis ia agado. Estas tre vigla urbo kun afablaj enloĝantoj. Ni vizitis preskaŭ ĉiujn vidindaĵojn kaj vidis multon rimarkindan, ekz. la papilian ĝardenon, la Batu-grotojn, la nacian moskeon, ĉinajn templojn, la centran bazaron k.a.

Esperantistojn ni tamen ne sukcesis trovi. Sed ni informis ilin poŝtkarte pri

nia intenco reveni, kaj kiam ni revenis al Kuala Lumpur survoje hejmen el Aŭstralio, nin atendis en la hotelo mesaĝo de la loka esperanto-klubo. Ni ne nur renkontis la esperantistojn, sed estis invitataj loĝi en la hejmo de samideanino Sook Wai Chan! Tiel nia dua vizito al Kuala Lumpur fariĝis hejmeca en duobla senco, ĉar ni jam sufiĉe bone konis la urbon kaj nun ni ankaŭ vivis kiel la aliaj urbanoj.

La malgranda klubo ankoraŭ ne havas apartan ejon por renkontiĝi, kaj tial oni kutime kunvenas en kafejo sur la dua etaĝo de la centra bazaro. Okaze de

nia vizito, alvenis kelkaj klubanoj kaj ni interbabilis trinkante kafon. Kompreneble ni ĉiuj ĝojis pro la interkonatiĝo, sed la ĉirkaŭa bruo tamen ĝenis la interparolon. Instrui la lingvon en tiaj kondiĉoj bedaŭrinde ne eblas, kaj sekve la klubo ne povas kreski. Ebla solvo povus esti kunlaboro kun alia organizaĵo kun similaj problemoj.

Malajzio estas multnacia kaj multlingva lando. La ĉefaj nacioj estas la malaja, la ĉina kaj la hinda, kiuj ĉiuj estas

reprezentataj en la loka esperanto-klubo. Tiu fakto tre plaĉis al ni.

La oficiala lingvo estas la malaja, kiu ludas la saman rolon en Malajzio, kiel la svahila en kelkaj afrikaj landoj, t.e. de komuna lingvo. Tiun similecon inter la du lingvoj pritraktis seminario en la universitato de Malajzio la 4-an de februaro. Ni ĉeestis la seminarion kaj poste havis okazon paroli kun profesoro Ismail Hussein de la Instituto de malajaj lingvo, literaturo kaj kulturo. Parolan-

te pri lingvaj problemoj en Eŭropo, li diris, ke en multlingva Azio oni kun granda intereso atentis la disvolviĝon de la lingvosituacioj precipe en Anglio kaj en la Eŭropa Komunumo!

Esperanto tre interesis lin kaj li tuj invitis nin informprelegi en la universitato! Bedaŭrinde ni jam la saman vesperon devis forflugi al Svedio, sed ni interkonsentis, ke la loka esperanto-klubo kontaktos lin por aranĝi informprelegon. Espreble li parolis serioze – ni nun atendas novaĵojn pri la afero de Kuala Lumpur.

Anita Bergh  
Agneta Emanuelsson



*Dum la vizito en Kuala Lumpur, Agneta kaj Anita ĝuis la gastamon de Chan Sook Wai (dua de dekstre, apud Anita) kaj ŝia familio. Ĉinaj frandaĵoj bongustas, eĉ per kulero! (Foto: A. Emanuelsson)*



*Membroj de la Esperantoklubo en Kuala Lumpur studas svedajn materialojn, i.a. La Esperon. Manke de propra ejo, la klubo kunvenas en urba kafejo, kio bedaŭrinde malhelpas ekz. aranĝadon de kursoj. Inter la klubanoj estas reprezentataj pluraj el la multaj nacioj loĝantaj en Malajzio. (Foto: A. Emanuelsson)*

## SEF skriver till Utbildningsdepartementet

I början av januari har Esperanto-förbundet i ett brev till Utbildningsdepartementet framfört några synpunkter på Läroplanskommittens betänkande *Skola för bildning* (SOU 1992:94).

Betänkandet understryker vikten av ökade språkkunskaper inför framtidens tilltagande internationalisering. SEF delar denna uppfattning, men vill i detta sammanhang påminna om svårigheten för ett litet språk som svenskan att hävda sig gentemot de "stora" språken. I längden finns en risk för kulturell utarmning. Tanken på ett neutralt internationellt språk gör sig påmind.

I betänkandet rekommenderas att varje skola ska få tid att skapa en egen profil. Vissa skolor kommer säkert att välja en internationell inriktning. SEF pekar på esperantos väl dokumenterade propedeutiska värde vid studiet av andra språk och rekommenderar att man experimentiellt inför detta språk bland B- eller C-språken.

När det gäller kontakter och utbyte mellan svenska och utländska skolor, påminner SEF om att sådan verksamhet länge förekommit via esperantokunniga lärare. Särskilt livliga har dessa kontakter varit med de forna öststaterna och de baltiska länderna.

## Tra la mondo

### Nova Monda Forumo

Antaŭ ne longe aperis nova numero de *Monda Forumo*, organo de Monda Kunaĝado por eduko, scienco kaj kulturo, kiu celas esti esperantista Unesko-asocio. Ĝin redaktas Mark Fettes, bone konata kiel antaŭa redaktoro de revuo *Esperanto*. La plej nova numero enhavas multajn interesajn artikolojn i.a. pri edukado, medio kaj protekto de minoritataj kulturoj. Estas en ĝi raporto de la seminario pri Minoritatoj en Nordio, kaj ankaŭ artikolo de Ebbe Vilborg pri la temo "Ĉu esperanto povas esti minaco kontraŭ la minoritataj lingvoj?".

Se vi ne jam abonas al *Monda Forumo*, nepre petu senpagan provkzempleron de **Ulrich Becker, Plauner Str. 39, D-O-1092 Berlino, Germanio**.

### Profitiga Infana kongreseto

Dum la venonta Universala Kongreso okazos en Valencio, en najbara urbeto

okazos la 28-a Internacia Infana Kongreseto. Se vi do konas inteligentan, aventureman infanon, kial ne peti pli da informoj pri la venonta IIK? Ĝi promesas esti la plej bona ĝis nun!

Ĉar oni ofte supozas, ke tiu aranĝo estas nur por denaskaj esperantistoj, indas substreki, ke ĝi estas aparte profitiga por tiuj geknaboj, kiuj eklernis la lingvon dum la antaŭa jaro.

Infanoj parolantaj Esperanton estas nia plej bela propagandilo, ĉu ne?

Petu pliajn informojn de la ĉeforganizanto:

**Christopher Fettes, St Columba's College, Dublin 16, Irlando, fakso: +353 1 93 66 55.**

### Nova bibliografio

En Finnlando la esperantisto kaj bibliotekisto Paula Harju, kadre de siaj studoj ĉe la universitato Åbo Akademi, kompilis novan bibliografion pri la esperantolibroj de la urba biblioteko de Turku. Ĝi estas titolita *Esperantolitteraturen vid Åbo Stadsbibliotek - En bibliografi* kaj priskribas la kolekton en la lingvoj sveda, finna kaj esperanto. El la enhavo evidentiĝas i.a. ke la biblioteko posedas 295 esperantoling-

vajn titolojn, el kiuj la plejmulto estas libroj. Krom verkoj originale verkitaj en Esperanto, troviĝas tradukoj el 23 aliaj lingvoj. Unu ekzemplero de la bibliografio jam estas sendita al UEA por la Biblioteko Hodler, kiu esprimis sian intereson ekhavi la bibliografion.

### Kongresu en Tanzanio!

Tanzania Esperanto-Asocio planas aranĝi jarkongreson en la urbo Bunda inter la 5-a kaj 12-a de junio 1993. Bunda situas en la nord-okcidenta parto de Tanzanio, proksime al la lago Viktorio.

TEA kore invitas eksterlandajn partoprenantojn. Se vi deziras partopreni grupvojaĝon, vi devos esti en Daresalamo plej malfrue la 31-an de majo.

Oni planas ekskursojn al la lago Viktorio kaj la granda nacia parko Serengeti, unu de la plej konataj en la mondo.

Se vi iam pripensis vojaĝon al Afriko, kial ne kapti la okazon nun? La tanzaniaj esperantistoj kun ĝojo kaj gastamo akceptos vin.

Por pliaj informoj skribu al:

**Tanzania Esperanto-Asocio, SLP 23390, Dar es Salaam, Tanzanio.**

## Tra la lando

### Korea vespero Afrikaj impresoj en Gotenburgo

Kiam la klubo La Venkonta Stelo en Norrköping klubkunvenis la 26-an de februaro, la temo estis Koreio. Invititaj prelegantoj estis la SEF-prezidanto Roland Lindblom kaj lia edzino Boo-Mee Lindblom. Ili montris diapozitivajn kaj rakontis pri tiu azia lando. Poste, dum Roland plurakontis pri la korea esperanto-movado, Boo-Mee preparis surprizon: Subite envenis la klubanoj Nina Andersson kaj Kent Kilby en tradiciaj vestoj de korea geedza paro!

Post kafrinkado Roland rakontis pri la pensoj de SEF koncerne labormanierojn de Esperanto-klubo.

Okaze de la Semajno de Internacia Amikeco, kiu ĉi-jare ja okazis 22-28 februaro, la gotenburgaj esperantistoj invitis Anita Bergh por prelegi pri Tanzanio. Pere de ŝia sprita prelego kaj multaj bildoj, la 25-persona publiko multon eksciis pri la vivo en tiu afrika lando kaj pri la esperanto-movado tie. En Gotenburgo oni antaŭ nelonge komencis ĝemelan kunlaboron kun klubo en Tanzanio, kaj por tiu grupo estis speciale interese

ricevi personajn impresojn pri la lando. Sukcesa vespero kaj aparte pripensinda en ĝuste tiu ĉi semajno. La vesperon aranĝis Esperanto-Alliansen i Göteborg kaj Göteborgs Esperantoförening.

### Ny esperanto-lokal i Göteborg

Göteborgs Esperantoförening har flyttat till en ny lokal vid Masthuggsliden 1 ovanför Masthuggstorget. Lokalerna, som ägs av den lokala hyresgästfören-



**Trifolio pretigis kasedon.** Sur la bildo tri membroj el la fakte 4-persona kantgrupo Trifolio, kiu konsistas el Lotta Johansson, Adina Giselsson, Ulrika Sjögren kaj Karin Sandgren. Ĉiuj kvar knabinoj trapasis esperantokursojn ĉe la popolaltlernejo de Karlskoga. Antaŭ iom da tempo aperis ilia unua kasedo, Trifolio kantas en Esperanto, kun plejparte tradukitaj kantoj. Ĝi estas mendebla kontraŭ pago de 75 kronoj al la poŝtĝira konto 670706 – 6285, Lotta Johansson, aŭ de Esperanto-Centro. La prezo inkluzivas tekstokajeron.

ingen, är stora och trivsamma och lätt-  
åtkomliga från Masthuggstorget och  
från Fjällgatan med buss 85. Här sam-  
manträder Göteborgs Esperantoförening  
varje tisdag kl 19-21. Alla esperantister  
hälsas välkomna! Adress: **Masthuggs-  
liden 1, 413 18 Göteborg, tel: 031/  
12 05 94.**

## Renaskiĝinta bulteno en Gotenburgo

Kun ĝojo ni informas la esperantistojn  
en Svedio, ke ĉi tie, ĉe la pordo de la  
granda mondo, la Esperanto-Societo de  
Gotenburgo vekis sian dormintan infor-  
milon, *inter-LIGILO*. Planita eldonofteco  
de la gazeto estas 4-5 numeroj jare, kaj  
la enhavo rakontos pri la esperantaj  
okazaĵoj en Gotenburgo. Membroj de la  
societo ricevas la bultenon senpage, kaj  
por aliaj ĝi estas abonebla kontraŭ 40  
SEK jare. Adreso de la redakcio: **Espe-  
ranto-Societo de Gotenburgo, Mast-  
huggsliden 1, 413 18 Göteborg. Pg  
43 612 - 1.** Indiku "inter-LIGILO".

## Viva gazeto en Malmö

El la bulteno de la Malmö-klubo, *La Folio  
2/1993*, ni ĉerpas eron pri amuza kun-  
veno:

"Viva gazeto la 3-an de februaro mont-  
ris multajn interesajn kaj enhavoricajn  
paĝojn. Ĝin malfermis la redaktoro  
**Asta**, lerte kaj bonhumore ĉerpante el sia  
literatura provizejo; ŝi parolis pri propa-  
gando laŭ Setälä, filozofis pri edza hejma  
helpo kaj malhelpo, kaj klarigis pri la plej  
perfekta horloĝo – la kat-okulo!

**Gertrud** laborigis niajn cerbojn dum  
du streĉaj vortludoj, kaj ŝi ankaŭ ordigis  
kvitanc-skatolon laŭ ŝerca Gruk-metodo.

**Gerd** legendoforme montris i.a. la  
strangan interrilaton inter Noa, truo en  
la arkeo, serpento kaj ekesto de la puloj.

**Kjell** varmsente laŭtlegis la kortuŝan  
poemon de Ulf Lundell, *Mi preferas vas-  
tajn spacojn*, kaj **Ove** trafoliumis sian in-  
teresan taglibron de la UK 1981 pri ofi-  
cialaj kaj pli-malpli sekretaj travivaĵoj en  
la grandurba vivo de Stokholmo.

**Gulli** gvidis nin al malnova tempo, al  
iamaj herbejoj kaj bienoj en la nun  
aŭtoriciaj ĉirkaŭaĵoj de nia klubejo, ĉer-

pante el nostalgie rememora verko pri  
*Rostorp*."

## Stokholmanoj kleriĝas

En la ĉefurba regiono aktivas pluraj Es-  
peranto-societoj. Krom kelkaj alligitaj al  
SEF, troviĝas ankaŭ SLEA-klubo, KELI-  
klubo kaj memstara junulara grupo. La  
diversaj kluboj tradicie kunlaboras pri  
i.a. ĉiu-monata komuna programfolio,  
printempaj kaj aŭtunaj festoj kaj stipen-  
dioj por kursfinintoj. Ekde la komenco de  
februaro aldoniĝis nova speco de komu-  
na, ekster-kluba tereno: ĉiun duan di-  
manĉon kunvenas la ŝerce pomp-titola  
**Rondo de Komuna Kleriĝo** (RKK),  
malferma por ĉiuj kleriĝemaj stokholmaj  
esperantistoj (kaj vizitantoj, komprene-  
ble!). Temas pri kuna studado sen gvi-  
danto, kie la partoprenantoj alterne ini-  
ciatas kaj preparas temojn por la kun-  
venoj. Ĝis nun oni traktis i.a. la signi-  
fon de la soveta esperantologo Drenen,  
problemojn kaj terminologion de medi-  
protekta laboro, tradukadon, la libron *La  
bona lingvo* de Claude Piron kaj la dife-  
rencojn inter diversaj etnoj en Afriko.  
Krome oni ĉiufoje faris praktikajn ekzer-  
cojn pri iu faceto de la esperanta grama-  
tiko. La nombro de partoprenantoj ĝis  
nun variis inter dek kaj dudek. Multaj es-  
primis sian kontentecon pro la samtem-  
pe agrabla kaj serioze laborema etoso.

\* \* \*

### Raportu al La Espero per tekstoj kaj bildoj!

*Miniatur:*

## Survoje

La kvietiga obtuza batado. La dol-  
ĉa odoro de polvo kaj homoj. Li si-  
dis ĉe la fenestro.

Per malrapidaj movoj li komen-  
cis pretigi sin. Li serĉis kaj serĉis.

Nerveze li vanrigardis sub la si-  
dejo. La trajno proksimiĝis al lia  
celo. La brunaj galoŝoj la tutan  
vojaĝon protektis liajn nigrajn, bri-  
lajn ŝuojn.

**Edita Köhler**

# "Gluntoj" kantas en Esperanto...

## Kiamaniere la luno interesiĝas pri la glunto kaj la magistro

(Nu tror jag det kan vara tid)

**Glunto:** Mi kredas, ke jam tempas nun  
pripensi la refrenon.  
Plej festa tago finas kun  
litplumoj la promenon.

**Magistro:** Kaj dolĉe sonĝi laŭ kutim'  
pri oro kaj arbaroj,  
en propra hejmo varmulin',  
drinkejoj kaj najbaroj.

**Ambaŭ:** Rectissime! Strictissime!  
Kaj tostu, amantissime!  
En propra hejmo varmulin'  
drinkejoj kaj najbaroj.

**Glunto:** La lunon vidu – kun frivol'  
li gapas al pavimo.  
Ĉu estas, frato, li simbol'  
pri nia pantomimo?

**Magistro:** Ĉagrenas lin ofice, ke  
sen unu sola guto  
li tamen tie vagu tre  
plenplena kiel puto!

**Ambaŭ:** Rectissime! Strictissime!  
Kaj tostu, amantissime!  
Li tamen vagu tie tre  
plenplena kiel puto!

**Glunto:** Ho vidas mi: Li brilas al  
ŝlostroo de la loĝo,  
ne ŝatas, ke la bakanal'  
finiĝu per diboĉo.

**Magistro:** Matenon bonan! Post plezur'  
nun al hejma celo.  
Direktas al ŝancela krur'  
la kara lunkandelo!

**Ambaŭ:** Rectissime! Strictissime!  
Kaj tostu, amantissime!  
Direktas al ŝancela krur'  
la kara lunkandelo!



La unua "Glunto" (basvoĉo):  
**Otto Beronius**

### Agordu vin per sento Upsaleca!

Prepariĝu por la ĉi-jara SEF-kongreso, konatiĝante kun la "Gluntoj" (svede: *Gluntarne*). Temas pri kolekto de trideko da kant-duetoj, komponitaj de Gunnar Wennerberg (1817–1901) por distri liajn studentajn kamaradojn kaj aperintaj prese en 1849.

En la kantoj dialogas du petolemaj studentoj, la magistro kaj la "glunto" (*glunt* estis tiutempa slango por "knabo, kamparana studento"). Pentriĝas idilia kaj humura bildo pri la studenta vivo en Upsalo en la 1840-aj jaroj. La kantoj fariĝis siatempe vera furoraĵo, kaj restas daŭre konataj kaj ŝatataj. Ni dankas al nia dana samideano **Poul Thorsen** pro la jenaj tradukitaj specimenoj!



La unua "Magistro" (baritono):  
**Gunnar Wennerberg**

### Lunbrila nokto sur Kastelmonteto

(Herre, min Gud, vad den månen lysar)

**Magistro:** Ho, mia Dio, la luno brilas.  
Vidu la lumon super la urbet'.

**Glunto:** Steloj sur klara ĉiel' trankvilas,  
treme invitas nin por amikec'.

**Ambaŭ:** Jen flamas Sirius, jen Orion,  
banas sin la Cigno en nokt-kviet'.  
Ho, mia Dio, la luno brilas.  
Vidu la lumon super la urbet'.

**Magistro:** Kia nordlumo! Neniam dum la  
paso de jaroj pli simila flam'.

**Glunto:** Jes, tiel estas maldormi kun la  
bona konscio, ke malfruas jam.

**Ambaŭ:** Vidu, el Upsala-pradolmenoj  
frapas ĝisĉiele la lum-ornam'!  
Kia nordlumo! Neniam dum la  
paso de jaroj pli simila flam'.

**Magistro:** Kie troveblas en Sveda lando  
loko kun nokto de simila bel'?

**Glunto:** Dormi prefere ĉe voja rando  
ol sur kusenoj supre en kastel'.

**Ambaŭ:** Tamen nun ek por frapveki *Lamby*\*).  
Kio pli bongustas ol nokt-botel'?  
Kie troveblas en Sveda lando  
loko kun nokto de simila bel'?

\*) *Lamby* [lambi] estis kontrabanda drinkejo en Upsalo.





## ... kaj "Funela Bando" ludos en Upsalo!

Antaŭ preskaŭ dudek jaroj, la ĵaz-bando **Trattbandet** komencis kiel "pura New Orleans-bando". Hodiaŭ ili, sub gvido de la esperantisto Kaj Stridell, karakterizas sin kiel "Dixieland-bando", sed ne tro zorgas pri stila ortodokseco, se nur "svingigas". Ke tiu kvalito ne mankas, tion pravas la

entuziasmo de multaj festival-publikoj tra la jaroj, ne nur en Svedio, sed ankaŭ en Nederlando, Finnlando kaj Germanio. En la laste menciita lando la bando turneis en kvin sinsekvaj jaroj. Kaj en sia hejmurbo Västerås, **Trattbandet** fariĝis neanstataŭebla vigliganto de festaj okazoj, ĉu

inaŭguroj de aĉet-centroj aŭ geedziĝoj. Pluraj kasedoj kaj kompaktdiskoj bone vendiĝis. Nun venos la vico al la SEF-membraro ĝui la gajan ĵazon de **Trattbandet**! Ili nome ludos okaze de la SEF-kongreso en Upsalo, pli precize post la vespermanĝo dimanĉe la 30-an de majo.

### La glunto en aŭditorio

(Har du hört min malör i går?)

**Glunto:** Ĉu vi aŭdis pri mia fatal'  
Per Diablo sendita?  
Se mi pensas pri la skandal'  
hontas mi plenmerita.

**Magistro:** Ĝis nun aŭdis mi pri neni'.  
Diru tuj, ke mi konu pli.

**Glunto:** Mi vizitis...

**Ambaŭ:** Malsaĝe, jes!  
Stultege, jes!

**Glunto:** Mi vizitis prelegon, ke  
konu min profesoro  
unu fojon almenaŭ de  
mia ŝajna fervoro.

**Magistro:** Ne malbona semestro-fin'.  
Do, vi bone lokigis vin?

**Glunto:** Benk' unua...

**Ambaŭ:** Malsaĝe, jes!  
Stultege, jes!

**Glunto:** Benk' unua, malplena lok',  
sola mi tie tronis  
sen ĉapelo kaj sen apog',  
dum prelego eksonis.

**Magistro:** Tute bone, ĝis nun, ĉu ne?  
Kial do via "aĥ" kaj "ve"?

**Glunto:** Pro la gumo...

**Ambaŭ:** Malsaĝe, jes!  
Stultege, jes!

**Glunto:** Pro la gumo-elastiko\*),  
trahakita, deklama,  
eklezia pneŭmatiko,  
sensencaĵo fifama.

**Magistro:** Jes, tedege aŭskulti, ĉu?  
Kial resti kaj stulti plu?

**Glunto:** La aero...

**Ambaŭ:** Malsaĝe, jes!  
Stultege, jes!

**Glunto:** La aero kaj varmo-sent'  
tute melankolie  
premis pli ol la elokvent'  
ĝis aŭskulto nenie.

**Magistro:** Mi komprenas l'aferon nun.  
Vi ekcedis al - palpebrum'.

**Glunto:** Mi ekdormis...

**Ambaŭ:** Malsaĝe, jes!  
Stultege, jes!

**Glunto:** Mi ekdormis, amiko, fi!  
Ĉu simile spektiĝis?  
Horo pasis de du ĝis tri,  
antaŭ ol mi vekigis.

**Magistro:** Jes, fatale, sed fi kaj for,  
se ne vidis la profesor'.

**Glunto:** Sed mi ronkis...

**Ambaŭ:** Malsaĝe, jes!  
Stultege, jes!

**Glunto:** Jes, mi ronkis, freneza ĝu'  
por salona humoro.  
Pro ronkego kaj rido-bru'  
finis la profesoro.

**Magistro:** Nu, anstataŭ skandala fin'  
kial simple ne vekii vin?

**Glunto:** Ili provis...

**Ambaŭ:** Malsaĝe, jes!  
Stultege, jes!

### Sunsubiro en Eklundhof

(Vad det är skönt ändå)

**Magistro:** Aj, kiel bele nun  
sine de la naturo.  
For de la studenta zum',  
for de la urba fum'.

**Glunto:** Sur la ĉiela blu'  
- blua anĝel-okulo -  
glitas nubetoj plu:  
blanka ŝafido-flu'.

**Ambaŭ:** Alte tra la arbar'  
ĝeme la pinoj spiras.  
Klinas sin par' ĉe par'  
blanka galanto-mar'.  
Ho, subiranta Sun',  
iom hezitu nun!  
Sen via brila bel'  
orfas ni en malhel'.

**Magistro:** Vidu, ĉu ne sur musk'  
elfoj festene dancas?  
Turdo el la arbust'  
taktas el plena brust'.

**Glunto:** Turdo, silentu jam!  
Lasu al Sun' parolon.  
El la fadanta varm'  
fluas rideto-flam'.

**Ambaŭ:** Ho, subiranta Sun',  
iom hezitu nun.  
Sen via brila bel'  
orfas ni en malhel'.

Tradukis:

**Poul Thorsen**

\*) Gumo-elastiko: slange por eklezia dogmaro.

## Traduku!

### Rubriko por lingvaj defioj

Ĉu vi estas tia esperantisto, kiu ne volas stagni je certa nivelo de lingvoscio, sed volonte streĉas viajn fortojn por progresi al ĉiam pli alta grado de lingvoscio? Ĉu vi sentas plezuron serĉante la ĝustan vorton, la trafan esprimon? Do, jen nova rubriko ĝuste por vi!

La ideo – kiun ni cetere ŝuldas al la leginda gazet-kolego *Esperanta Finnlando* – estas simpla: En ĉiu numero aperos mallonga teksto en la sveda, kaj via tasko estas traduki ĝin en laŭeble bonan esperanton. Vian tradukon vi sendos al *La Esperanto*, kaj en la sekva numero la redaktantoj de la rubriko (Per Aarne Fritzon kaj Bertilo Wennergren) komparas kaj diskutas la diversajn proponojn kaj provos surbaze de ili kunmeti laŭeble plej bonan tradukon de la tuta teksto. Notu, ke ne temas pri ia konkurso! Unuopaj nomoj ne estos menciitaj. La ideo estas kune esplori la rimedojn de la lingvo kaj iom post iom perfektigi nian kapablon esprimi ĉion en Esperanto. Do pli gravos strebi ol ĉiufoje pravi...

Cetere: kial ne fari la taskon kune kun aliaj – ekz. kadre de kluba kunveno?

La tekstoj estos diverstemaj, sed verŝajne ili plej ofte venos el svedaj ĵurnaloj. Tio estas konscia elekto, ĉar la ĵurnaloj per sia enhavo spegulas ĉiujn facetojn de la reala mondo. Imagu, kiom da temoj oni ankoraŭ neniam traktis en Esperanto! Eĉ spertaj esperantistoj certe trovos, ke la tasko esperantigi tute ordinaran novaĵ-noticon povas prezenti neatenditajn malfacilaĵojn. Aliflanke tio ankaŭ signifas, ke se ni konfrontas kaj sukcesas venki tiajn malfacilaĵojn, ni per tio fakte konkeras novajn terenojn kaj riĉigas la lingvon. Eble rezultos solvoj kaj esprimoj, kiuj meritos lokon en venontaj vortaroj.

Jen la unua teksto, ĉerpita el la ĵurnalo *Dagens Nyheter* la 3-an de majo 1993:

"– Det är något grundläggande fel när barnen ska sitta här inne, i klassrummet, och lära sig hantera livet där ute, det som pågår utanför skolans fönster. Det kan barnen aldrig uppfatta som annat än konstlat.

Susan Humphries, en smått legenda-

## Nia lingvo

### Fråga om ordboken!

"Ordboken" i bestämd form syftar naturligtvis på vår nya Ordbok Svenska-Esperanto, som sedan den kom ut i fjol snabbt blivit ett omistligt hjälpmedel för varje seriös svensk-språkig esperantist. Vi är många som kan intyga dess förtjänster, men kan en ordbok någonsin vara helt perfekt? Kanske har även du under användningen av ordboken stött på något du ställer dig frågande till: det kan röra sig om en ren felaktighet, en oklarhet, eller kanske bara en betydelsenysans du tycker borde vara med. Hjälp till att skingra sådana frågetecken och göra nästa upplaga ännu bättre! Ordbokens redaktör, Ebbe Vilborg, står beredd att i *La Esperanto* besvara läsarnas frågor om ordboken. Skicka dem till honom under adress: **Ebbe Vilborg, Prästgårdsängen 2, 412 71 Göteborg.**

Vi börjar redan nu med två inkomna frågor:

**Fråga:** På sid 151 under **idiom 2** står det **idiotismo**. Skall det inte vara **idiomismo**?

**Svar:** Här är det frågan om **idiom** i betydelsen "språkegenhet" (sådana finns det fullt av i nationalspråken, förhoppnings-

risk rektor från södra England, sitter i en skolmatsal uppe i Kiruna när hon säger detta. Hon har just bjudits på norrbottniska läckerheter av Bergaskolans personal och hon pekar ut mot den snötäckta skolgården där barnen och några av lärarna byggt grottor, slott, bilar, källar, lyktor med mera av detta fantastiska material som faller helt gratis från himlen varje år och ligger kvar sju av skolårets tio månader.

På vintern fungerar denna skolgård som en underbar lekplats där barnen får utlopp för både skaparglädje och rörelsebehov. Annat är det på sommaren: en blåsig asfaltplan med några fotbollsmål, en flaggstång, lite bord och bänkar."


Sendu vian tradukon antaŭ la 10-a de junio al la adreso: **Per Aarne Fritzon, Västertorpsvägen 154, 129 44 Hägersten.** Bonan sukceson!

vis färre i esperanto). Man kan använda termen *idiom/aĵo* (sådant som hör till till ett visst idiom, detta ord då taget i betydelse 1 = språk, språkform). Men det finns också den internationella termen *idiotismo* (som vi också har som främmande ord i svenskan: idiotism); om denna säger PIV: "Nelogika aparta vortkonstruo, propra al iu lingvo sed ne al aliaj". Det är ett officiellt esperanto-ord och användes utav Zamenhof: "En Esperanto trovigas diversaj ne multaj idiotismoj".

**Fråga:** Sur la paĝo 114, sub la vorto **genus** (gram., biol.) estas skribite *ĝenro*. Devas esti *genro*, ĉu ne?

**Svar:** *Genus* är i svenskan väl mest bekant från grammatiken; som biologisk term betyder det "släkte". I esperanto finns både *genro*, som kan vara både grammatisk och biologisk term, och *ĝenro*, som är en konstterm: "genre, -målning". Frågaren har alltså rätt: det bör stå **genus** (gram., biol.) *genro*.

Ebbe Vilborg



**Nova kasedo de jomart kaj Nataŝa!**  
Prezo: 85 SEK  
Mendu de Esperanto-Centro

## Reagoj:

### Om "atism" i ordboken

Jag vet att det är kutym att inte kommentera vad som sägs i recensioner, men i Bertil Wennergrens anmälan av ordboken (*La Espero* 4-5/92) finns ett påstående jag inte kan låta stå oemot-sagt. Om bruket av participen **-ata/-ita** i ordboken säger recensenten: "Atismen är en reformerad dialekt av esperanto." Nej, så enkelt är det verkligen inte. När jag ville visa vad jag stödjer mig på och att den s.k. atismen är lika gammal som språket självt, citerade jag vårt språks äldsta dokument, *Unua Libro*, i svensk översättning (sid VII-VIII). Detta är enligt Wennergren "helt oacceptabelt", eftersom endast *Fundamento* och ingenting annat är normerande. Må så vara, men i *Fundamenta Gramatiko* sägs ingenting som stöder det itistiska bruket av participen. De två exempel som där ges (i regel 6), "Ĉi estas amata de ĉiuj" och "La pordo estas fermita" stämmer väl överens med de tidsdefinitioner som participen presenteras med (**at** participo prezencia, **it** participo pasiva preterita; jag citerar efter esperanto-översättningen i *Fundamento de Esperanto*, 9-a eldono). Exemplet i den tillhörande *Ekzercaro* har diskuterats till leda; det kan inte vara Wennergren obekant, att de kan tolkas på mer än ett sätt. Sanningen är nämligen, att det finns två sätt att praktiskt använda dessa particip: ett som utgår från Zamenhofs grundidé i *Unua Libro* och från *Fundamenta Gramatiko* och som tar Zamenhofs uttryck "tempo" på allvar – och ett som är extrapolerat ur hans språkbruk men som, om det ut-

trycks med regler, förutsätter införandet av aspekter i stället för tempus i esperantos konjugation. Akademien har bundit sig vid den senare tolkningen; att dess beslut var förhastat visas av att diskussionen ingalunda har upphört. Men alla våra tidigare esperantiska ordböcker har använt participen precis som jag gör – och att (indirekt) beskylla Backman, Nylén, Jansson, Lindén och Gerdman för att inte ha uttryckt sig korrekt på esperanto är ohemult.

Ebbe Vilborg

### Bertil Wennergren svarar:

Först tre citat:

*Georgo Vaŝington estis naskita la dudek duan de Februaro de la jaro mil sepcent tridek dua.*

*Li sentis sin tiel malfeliĉa, ke li malbenis la tagon, en kiu li estis naskita.*

*Mia onklo ne mortis per natura morto, sed li tamen ne mortigis sin mem kaj ankaŭ estis mortigita de neniu.*

*Fundamento de Esperanto* består av tre huvuddelar: *Gramatiko*, *Ekzercaro* och *Universala Vortaro*. De tre citaten härovan finns i *Ekzercaro*. Den enda rimliga tolkningen av dem är itistisk. De alternativa förklaringar som har förts fram av atister är inget annat än bortförklaringar och är så befängda att jag inte ens vill gå in på dem här. Det finns också atister som erkänner att inte alla exempel i *Ekzercaro* stämmer med atismens

regler, t.ex. Richard Schultz, den mest aktive atisten just nu. Han anser dock på oklara grunder att *Ekzercaro* inte gäller som norm för esperanto, och kan därför vifta bort sådana exempel som rena felaktigheter.

För mig däremot är hela *Fundamento* den norm som språket vilar på, och således är dessa tre exempel rättesnören för hur språket ska användas och inte något som behöver bortförklaras.

Verbreglerna i *Gramatiko* består i stort sett bara av ett uppräknande av de olika ändelserna plus grammatiska "etiketter". Det är uppenbart att dessa kortfattade regler är otillräckliga för att förstå hur verben ska användas. Man kan bara förstå dem om man ser till exemplen i *Ekzercaro*.

Det itistiska språkbruket är lagfäst i *Fundamento*. Det var Zamenhofs språkbruk under hela hans liv. Det har av Esperantoakademien officiellt fastslagits som det enda korrekta. Det är det språkbruk som de flesta författare använder. Det är det språkbruk som används i de främsta esperantotidningarna. Det är det språkbruk som de flesta esperantister använder.

Atismen är en reformerad dialekt av esperanto. Att den har haft en viss spridning bland svenska esperantister gör den inte mindre felaktig.

Den som vill ändra på esperanto kan fortsätta denna debatt. För mig avgjordes saken redan 1905, när *Fundamento* stadfästes som officiell norm för esperanto.

Bertil Wennergren

Efter dessa två repliker sätter *La Espero* för sin del punkt för all vidare diskussion i detta ämne.

– Red.



## Klistermärken!

10 stora dekaler

eller

5 ark à 24 små klistermärken

50 kronor

Beställ från Esperanto-Centro idag!

# Använd sommaren till att förbättra din esperanto!

Medan höst- och vintersäsongen lämpar sig för kurser i lugnare takt, ett par timmar per vecka, kan sommaren och semestern med fördel användas till intensivare studier. Det kan oftast samordnas med en avkopplande semester.

Om dina esperantokunskaper är goda, får du stort utbyte av en vistelse på en större kongress, t. ex. årets världskongress i Valencia, där du möter många esperantotalande från hela världen. Behöver dina kunskaper förbättras på, är mindre arrangemang att föredra, t.ex. de olika seminarier och studieveckor som äger rum i stort sett i alla länder i Europa.

Tidningarna *Esperanto* och *Heroldo* har publicerat långa listor med arrangemang att välja mellan. Vi kommer här att nämna några som passar den som är ute efter att förbättra sin esperanto. I slutet av artikeln hittar du adresserna till respektive arrangörer. Vi anger inga priser, eftersom kronans instabila värde kan göra dem inaktuella redan innan *La Espero* går i tryck.

## Kurser i Norden

Först och främst vill vi nämna sommarkursen i **Karlskoga folkhögskola**, 7–12 juni, med undervisning på olika nivåer, under pedagogisk ledning av Lars Forsman. Hit kan du komma som alldeles färsk nybörjare, som deltagare i någon av fortsättningsgrupperna eller för att bygga på dina redan goda färdigheter. Se annons på sidan 2 för detaljer.

Vill du åka utomlands, behöver du inte åka längre än till Finland, till **Jyväskylä**, där den det anordnas en studievecka för 26:e året i rad, i år mellan den 4 och 9 juli. Det kan man kalla för tradition!

## I Centraleuropa

Längre söderut kan man hitta ställen där kurser pågår hela sommaren. I den nya staten Tjeckien kan du göra ett uppehåll i Mähren, i **Lančov**, där tre tillfällen ges till sommarkurser för nybörjare och mer försigkomna, från början av juli till mitten av augusti. Kolla med arrangörerna om de aktuella tiderna.

Kurserna är på två veckor, logi i stugor med 4–5 bäddar, utedass, nära till insjö med båt och badmöjligheter, allt till ett pris som ligger kring tusenlappen. Man läser på förmiddagarna och har eftermiddagarna lediga för egna verksamheter.

I den lika nya staten Slovakien ges



**KCE** KULTURA  
CENTRO  
ESPERANTISTA  
La Chaux-de-Fonds, Svislando

# 1993

## Ĝenerala Programo

det kursmöjligheter i **Poprad**, t.ex. 3–16 juli och 7–20 augusti. Dessa två kurser hänger samman och ger en mycket god bas för den som vill ägna sommaren åt att lära sig esperanto grundligt. Till Poprad kan man åka även vid andra tillfällen, t.ex. 10–14 september och bekanta sig med ortens svampar, på esperanto förstås!

## Och längre söderut

Ett rikt utbud kurser, föredrag och seminarier finns i Frankrike, i **La Kvinpetalo, Bouresse**, där det händer något hela sommaren: 10–15 juni ett seminarium om författaren Lorjaks verk; 9–14 juli förberedelser för esperantoexamen (5:e graden); 15–20 juli kongressförberedelser; 22–28 juli lingvistik med Blazio Vaha; 3–8 augusti seminarium om information och *public relations*; 12–17 augusti sykonst med Marie Hunnink;

19–24 augusti litteraturseminarium med Chris Declerck.

Men det rikaste utbudet hittar man i Schweiz, närmare bestämt i **La Chaux-de-Fonds**, där Kultura Centro Esperantista håller hus. Sitt program presenterar de i en 28-sidig broschyr, där hela 24 olika verksamheter äger rum under juli och augusti. Varje vecka håller man språkkurser på olika nivåer, men dessutom seminarier om så skilda ämnen som kvinnor i esperantolitteraturen, allmän språkvetenskap, om språk som samhällsfaktor, om etniska frågor, om Zamenhofs ideal, om ekologisk moral, om naturläkemedel... Skriv till adressen här nedan och be dem skicka sitt program.

## Skriv med detsamma!

Kan du inte tillräckligt med esperanto än? Skriv ett brev kort till arrangörerna med följande text: "Bonvolu sendi al mi informojn pri viaj someraj kursoj." och glöm inte att lägga till din adress. Men gör det med detsamma. Sommaren är här fortare än du anar!

### Karlskoga:

Karlskoga folkhögskola, Esperanto, Box 192, 69124 Karlskoga

### Jyväskylä:

S-ino S. Kettunen, Keihäsmienkatu 3, FIN-40630 Jyväskylä

### Lančov:

Esperanto, 67401 Trebič, Tjeckien

### Poprad:

Slovakia Esperanto-Asocio, Sobotske nam. 6, 05801 Poprad, Slovakien

### Bouresse:

La Kvinpetalo, Route de Civaux, F-86410 Bouresse, Frankrike

### La Chaux-de-Fonds:

Kultura Centro Esperantista, PF 779, CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Schweiz

### Burleska sed profunda

Miĥail Afanasjeviĉ Bulgakov: **La majstro kaj Margarita**. Tradukis: S.B. Pokrovskij. Sezonoj, Sverdlovsk 1991. 190 SEK.

– Ĉu tio estas vodko? ŝi demandis per malforta voĉo.

Pro ofendiĝo la kato saltetis sur sia seĝo.

– Kion vi diras, reĝino? li stertoris, ĉu mi aŭdacus verŝi al damo vodkon? Ĝi estas pura alkoholo!

Komika, burleska sed samtempe filozofie profunda kaj politike akra, tiom ampleksa estas la gamo de la ĉefverko de Miĥail Afanasjeviĉ Bulgakov, laŭ mi unu el la plej elstaraj literaturaj verkoj de nia jarcento.


Bulgakov, kiu naskiĝis en Kievo en 1891, travivis la rusan revolucion, la internan militon kaj la evoluon de la sovetia socio en la 20-aj kaj 30-aj jaroj, periodo timiga, sed ankaŭ neelĉerpebla fonto por kritika kaj kreiva verkisto. Krom la nun esperantigita *La majstro kaj Margarita*, Bulgakov verkis plurajn romanojn, novelojn kaj teatraĵojn, precipe pri la sovetia vivo de la 20-aj jaroj.

Kiam mi mem eklernis la Internacian Lingvon, unu el miaj revoj estis traduki *La majstron kaj Margaritan* en esperanton (ĉu tipa revo de novlernanto?). Feliĉe mi pro troa pigreco ne realigis tiun revon, kaj jen mi nun havas la plezuron legi ĝin en la brila kaj laŭ precizemo imitenda traduko de S.B. Pokrovskij.

La stilo de Bulgakov estas iom seka kaj formala el gramatika vidpunkto, kaj tio bone speguliĝas en la esperantlingva teksto, eĉ se mi foje dezirus iom pli da konsidero al la tradicia esperanta stilstiko.

La personaj nomoj estas ja ofta kaŭzo de miskomprenoj kaj frustracio dum legado de rusaj romanoj, sed ĉi tie la tradukinto klopodis transdoni la originalan senton, kaj ne amason da strangasonaj karesnomoj. Li do ekz. uzas la esperantlingvan karesformon *Natanjo* anstataŭ la originala *Nataŝka*. Bulgakov ofte ironie karakterizas homon per novkreita familia nomo, ekz. *Podloĵnaja* kaj *Bogoĥulskij*. Tiuj nomoj estas ruz/se tradukitaj kiel *Falsina* kaj *Sakrilegijskij*.

La du ĉefaj partoj de la romano, kiuj fine iamaniere unuigas, okazas en Moskvo en la 20-aj jaroj respektive en Jerusalemo je la tempo de la ekzekuto de Jesuo. La dua estas lerte enplektita en la unuan. La moskvaj ĉapitroj fideinde spegulas la socian atmosferon de la frua sovetia epoko, sed per multe da aludoj kaj ironio. Ĉi tie ni trovas ankaŭ la poste proverbigintan eliron de Satano mem: "La manuskriptoj ne forbrulas." Tio fariĝis vera ankaŭ rilate tiun ĉi romanon, finverkitan en 1940, sed publikigitan



MIĤAIL BULGAKOV

#### LA MAJSTRO KAJ MARGARITA



nur en 1966. La jerusalemaj ĉapitroj enhavas tute freŝan kaj profunde originalan reinterpreton de okazintaĵoj vaste konataj, sed malofte rigardataj kun tiom da scivolemo kaj kreiva pensado. Ekestis kvazaŭ kvina Evangelio.

La libro estas (ankaŭ fizike) estetike alloga, kaj preskaŭ mankas preseraroj. Aliaj eraroj ege maloftas, eĉ se troviĝas kelkaj strangetaj sintaksaj konstruoj kaj unuopaj rusismoj kiel "numero" anstataŭ "(hotel)ĉambro". La sola afero, pri kiu mi ne estas kontenta, estas la patronomoj finantaj per *-jeviĉ/-jevna*, kiuj estas skribitaj per *-iĉ* kaj *-vna*, ekz. *Nikolaiĉ* kaj *Nikolavna* anstataŭ la pli ofte uzataj *Nikolajevič* kaj *Nikolajevna*. Tia fonetika adapto estas laŭ mi troa; estas kvazaŭ ni skribus la nomon de unu el niaj svedaj verkistoj *Strimberj*.

Joakim Enwall

### Tuthomaraj mitoj kun ĉina gusto

**Ĉinaj Mitoj**. Reverkita de Yuan Ke. Trad: Li Baofa kaj Xu Wanfen. Ĉina Esperanto-Eldonejo. Pekino 1992. 95 p.

"Mito" laŭ PIV estas "Tradicia rakonto pri la dioj aŭ praavoj k ili aj agoj en la komenco de la tempoj, plejofte kun religia, drama karaktero k etiologia valoro". La intereso pri la mitoj ege kreskis ekde la pasinta jarcento. Montrigis ke similaj mitoj, ekz. pri la diluvo, aperas dise en multaj diversaj landoj. C.G. Jung konstatis ke la samaj motivoj aperas en mitoj kaj en sonĝoj, kaj donis psikologiajn klarigojn pri la fenomeno.

En "Ĉinaj Mitoj" ni renkontas dudek ĉinajn mitojn, kompilitajn laŭ fragmentoj en antikvaj libroj. Ili estas reverkitaj tiel ke la rakontoj iras flue. La leganto legos pri kiel Pangu kreis la mondon el sia korpo (komparu kun Ymer en la praskandinava mitologio), kiel Nüwa kreis la homojn el argilo (komparu kun la Biblio), kaj aliajn interesajn rakontojn.

Bona enhavo. Bona lingvaĵo. Bona prezo. Bona prezo. Bona prezo. Bona prezo.

Leif Nordenstorm

### Eleganta stilo konsilinda al komencantoj

Sten Johansson: **La denaska kongresano kaj aliaj noveloj**. Eldonejo Al-fab-*et-o*. Skövde 1992. 48 p. 30 SEK.

Jen naŭ noveloj en simpla sed tre flua, eleganta stilo. Emociaj, foje ridigaj, kiel tiu "Renkontiĝo kun boaco". La aŭtoro estas regula premiito de la Belartaj Konkursoj de UEA, kio pruvus, ke ties ĵurianoj bone faras sian laboron! Ne maltrafu okazon konsili tiun ĉi libreton al komencantoj.

Jak Le Puil

(el Kancerkliniko n-ro 65, januaro 1993)

# Memor- pecetoj

Certe multaj el niaj legantoj persone konas **Regina Emson**, estonan esperantistinon, kiu jam de longe vivas en Svedio. En la jaro 1953 ŝi ricevis sian formalan svedan ateston pri esperanto; pli frue ne eblis, ĉar ŝi ne parolis sufiĉe bone la svedan – hejme ŝi nome parolis nur esperanton!

Regina Emson loĝas en Borås, kaj fariĝos baldaŭ 85-jara. Ŝi trapasis operaciojn kaj momente ne povas iri, sed cetere la sanstato estas denove pli bona.

Ŝi esperantistiĝis jam en 1920, instigita de sia fratino Elisabeth Lübek-Linnuse. Kursgvidanto estis ilia kuzino, la fama esperanto-poeto Hilda Dresen. Baldaŭ Regina komencis korespondi en esperanto. Nun, post pli ol 70 jaroj, ŝi daŭre ofte skribas leterojn en esperanto.

En majo 1973, do antaŭ 20 jaroj, Elisabeth Lübek-Linnuse mortis. Regina Emson petis publikigon de la jenaj memorvortoj pri la fratino, verkitaj de ties iama lernantino Linda Toningas-Vanaans, kiu intertempe ankaŭ forpasis:

## Tiel mi memoras ŝin...

Ĉi-aŭtune pasos 60 jaroj de kiam mi renkontis la unuan fojon mian matan instruistinin Elisabeth Lübek, kiu pli poste estonigis sian nomon al Linnuse.

Mi estis lernantino en la elementa lernejo, kiam mi ekhavis novan instruistinin, Elisabeth (Elinjo) Lübek. Ŝi plaĉis al mi de la unua renkontiĝo. Ŝi havis plaĉan eksterajn kaj estis simpla sed bonstila en sia vestado. En la klaso ŝi estis postulema. Al ni – 13- ĝis 14-jaraj knabinoj – ŝi ŝajnis kelkfoje eĉ tro severa. Sed ni sciis, ke ŝi estas justa, kaj ankaŭ tiam, kiam ŝi *pretendis* esti kolera, en ŝiaj okuloj vibris kaŝa rideto. Tio kaŭzis, ke kvankam ni iom timis ŝin, ni samtempe amis ŝin kaj penis esti "bonaj infanoj" – t.e. plaĉi al ŝi. Ni ŝatis ŝin ankaŭ pro tio, ke dum la paŭzoj ŝi preferis ĉiam esti inter ni, kune promeni kaj babiladi. Tiam ŝi eĉ gaje ridis, kio malofte okazis en la klaso. Dum la paŭzoj ni kuraĝis libere interparoli kun ŝi.

Mi jam de komenco atentis, ke ŝi ĉiam portis sur sia brusto verdan stelon. Scivolema, kia mi ĉiam estis, mi foje kuraĝis demandi ŝin, kial ŝi portadas tiun insignon. Kiel nova lernantino, mi ne konis ĝin. Tiam ekbrilis ŝiaj okuloj, kaj

## Kalendaro

### MAJO

- 17–24 **Arta Semajno – Ni kreu kune!** Halle. (Esperanto-Jugend, dJ/Berliner Str. 49, D-O-1560 Potsdam, Germanio)  
28–31 **Junulara renkontiĝo en Uppsala.** (Jarkunveno de SEJU.) Vidu paĝon 5 de *La Espero* 1/93.  
29–31 **Sveda Esperanto-Kongreso**, Uppsala. Vidu paĝojn 3–5 de *La Espero* 1/93.

### JUNIO

- 6–12 **15-a Ĉebalta Esperantista Printempo.** Mielno. (Pola Esperanto-Asocio, skr. poczt. 30, PL-75-016 Kaszalin -1, Pollando)  
14–18 **Somera universitato de Lappeenranta.** Lappeenranta/Villmansstrand. (Jorma Toroppainen, Happortie 2 A 29, FIN-53900 Lappeenranta, Finnlando)  
28 junio–2 julio **Internacia Esperanto-Semajno en Tampere.** Tampere/Tammerfors. (Veli Hämäläinen, Teivaalantie 85, FIN-33400 Tampere, Finnlando)

### JULIO

- 2–4 **Internacia Renkontiĝo.** Tallinn (J. Ojalo, Narva mnt. 9-5, EE-0001 Tallinn, Estonio)  
4–9 **26-a Somera Studsemajno.** Jyväskylä. (Seija Kettunen, Keihäsmiehenkatu 3, FIN-40630 Jyväskylä)  
18–24 **Junulara seminario Urboj por vivi 1993.** Berlino. (Deutsche Esperanto-Jugend, Unter den Linden 38, D-O-1086 Berlin, Germanio)  
20–23 **Oficiala antaŭkongreso en Barcelono.** (Barcelona Esperanto-Centro, Carreras i Candi 34 - 36, E-08028 Barcelono, Hispanio)  
24–31 **78-a Universala Kongreso de Esperanto.** Valencio.  
31 julio–6 aŭgusto **Internacia Junulara Semajno.** Mikosszéplak. (Tibor Budai, H-8901 Zalaegerszeg, pk. 263, Hungario)  
31 julio–6 aŭgusto **27-a ILEI-konferenco kaj 2-a Gimnazio de ILEI.** La Paterna, Valencio. (Bertil Andreasson, Södra Rörum pl. 455, S-292 94 Hörby, Svedio)

### AŬGUSTO

- 7–14 **49-a Internacia Junulara Kongreso.** Vraca. (Loka Kongresa Komitato, p. k. 26, BG-3000 Vraca, Bulgario)  
19–22 **Kultura Esperanto-Festivalo 4.** Kopenhago. (KEF 4, p/a Jakob Nordfalk, Nørre Allé 75/571, DK2100 København Ø, Danio)

kun ĝoja fervoro ŝi rakontis al ni, ke tio estas la insigno de la internacia lingvo Esperanto, kaj ke ŝi jam de longe estis esperantisto. Ŝi rakontis al ni pri d-ro Zamenhof, kiu kreis la lingvon. Ŝi parolis pri multnombraj eksterlandaj korespondantoj, kaj kun speciala varmo pri la hungara poeto Julio Baghy, kiu estis unu el ŝiaj plej amataj korespondantoj. Ni demandis, ĉu ŝi ne volus instrui ankaŭ al ni tiun lingvon, kiu laŭ ŝia diro estas tiel facile elernebla. Ĝoje ŝi respondis, ke tre volonte ŝi farus tion.


Tiel ankaŭ mi fariĝis esperantisto, kaj poste mem havis plurajn korespondantojn en multaj eŭropaj landoj. La 26-a

Universala Kongreso en 1934 en Stokholmo estis la plej granda travivaĵo de mia vivo. Tien mi veturis kune kun Elinjo, estante tiam jam mem instruistino.

Ŝi ne estas plu inter vivantoj. Ŝi mortis la 13-an de majo 1973. Ŝi restis por mi ĉiam kvazaŭ pli aĝa fratino kaj amata samideanino, ĝis la sorto nin disigis. Por ĉiam mi memoros ŝin kiel fajran esperantistinon kaj amatan instruistinin, kaj en mia profesia instruista laboro mi ĉiam tre volis simili al ŝi: fidela al sia devo, postulema sed amata amikino por siaj "infanoj".

Linda Toningas-Vanaans

# Krucvortenigmo



Horizontale:

1. Malordigo en genuo
2. Dolĉajon en kafon
3. Era – Noktomeblo
4. Altvalora karto – Barilaj
5. Dezir-sciigon

6. Subportant' de konstruaĵo – Subportant' de kapo
7. Porkan grasajon
8. Reĝo de la bestoj – Kripla
9. Gento – Mara rabist'
10. Foliaĵ' – Fina stato laŭ budhismo

Vertikale:

- A. Mallonge esperantan – Plat' por servado
- B. Pruntas – Malgrande
- C. Helenan fortikaĵon
- Ĉ. Fiŝkaptil' – Svingon antaŭen
- D. Forta tiranto
- E. En vipo – Grup' – Poŝtrestante
- F. Mallumĉambran – Oleriĉa frukt'
- G. Sufikso veneniga – Brua
- Ĝ. Ĝermantribano – Fingrolok'
- H. Frakcioj – Pruntato

Kompilis: **Lennart Persson**

Solvo de la krucvortenigmo en La Espero n-ro 6/1992

	A	B	C	Ĉ	D	E	F	G	Ĝ	H
1	I	N	S	T	R	U	I	S	T	O
2	N	■	E	R	A	S	M	O	■	P
3	T	E	K	O	J	■	A	N	T	I
4	E	K	R	I	D	E	G	O	■	N
5	R	■	E	G	A	L	A	J	■	I
6	V	A	T	■	M	A	J	■	F	A
7	E	T	A	P	A	N	■	P	A	S
8	N	E	R	O	N	■	A	E	R	■
9	A	S	I	S	T	A	N	T	O	J
10	S	T	A	T	O	■	T	U	J	■

**"Själv kommer jag att göra flitigt bruk av Vilborgs utmärkta ordbok, och jag kan bara gratulera den som börjar lära sig esperanto nu."**

**- Bertil Wennergren**

**Pris: 400 kr**

## Ordbok Svenska-Esperanto.

Ca 500 sidor, inbunden. Med de nyaste orden. Priset inkluderar moms och porto.

Postgiro 578-5,  
Esperantoförlaget

Malmö Esperantoförening  
Kronetorpsg 94  
21227 Malmö

Esperantoförbundet, Brunngatan 21, 111 38 Stockholm

## Nekrologoj

### Bertil Bengtsson

Bertil Bengtsson, Hallsberg, mortis post mallonga malsano. Li naskiĝis en jaro 1918 kaj frue fariĝis esperantisto. Dum multaj jaroj ĝis sia morto li estis prezidanto en la Esperantoklubo en Hallsberg, kaj ankaŭ multjara revizoro de SEF. Kiel fervojisto li estis aktiva kaj en la sveda kaj en la internacia fervojista esperanto-movado. Al la nova sved-esperanta vortaro li kontribuis per fervojaj fakvortoj.

### David Sandström

multjara membro de Klubo Esperantista de Malmö, forpasis en la aĝo de 86 jaroj.

David, kiu dum la lastaj jaroj estis tre malsana, montris dum sia aktiva vivo grandan intereson por la esperanta movado. Speciale li havis la emon disvastigi konon de esperanto en foraj landoj, ekzemple en Azio, kaj multaj estis tiuj pakajoj kun esperantoliteraturo (speciale lernolibroj), kiujn li aĉetis ĉe Eldona Societo kaj sendis eksterlanden.

La funebra solenaĵo en la Kapelo de S:t Knut estis senpretenda sed digna. La klubon reprezentis Torsten Lund.

### Karl Wiklund

Karl Wiklund, multjara gotenburga esperantisto, mortis la 31-an de decembro 1992 en la aĝo de 80 jaroj. En sia juneco li laboris i.a. kiel maristo kaj post la dua mondmilito ĝis sia pensiĝo kiel veldisto ĉe la ŝipkonstruejo de Eriksberg. Kiel esperantisto li havis amikojn en multaj landoj, ekz. Israelo, Ĉeĥoslovakio, Aŭstrio kaj Germanio.

## Kultura Esperanto-Festivalo 4 19-22 aŭgusto 1993

Denove okazos KEF. Tri fojojn ĝi okazis en Svedio, sed ĉi-foje ĝi translokiĝos al Danio kaj Kopenhago. Se vi jam partoprenis, vi scias pri kio temas – pli ol tri tagoj dediĉitaj al muziko, teatro, poezio kaj aliaj kampoj de la esperanta kulturo! Kotizoj: Kultura programo – 250 DKK; manĝoj – 150 DKK; amasloĝejo – 50 DKK. Petu informojn kaj aliĝilon de:

KEF 4

p/a Jacob Nordfalk, Nørre Allé 75-571, DK-2100 København Ø



## KONGRESSMÄRKEN!

Skicka inga brev utan  
Uppsalakongressens brevärke!  
Beställ genom  
pg-konto 481 43 95-2  
SEF-jarkongreso

Pris inkl. porto

10 märken 15 kr  
20 märken 25 kr  
30 märken 35 kr

## Se ne estus 'se' kaj 'tamen', mi al ĉio dirus amen.

[PROVERBO EL LA PROVERBARO DE L L ZAMENHOF, KOMPOSITA PER LA LITERTIPO GROTESQUE N-RO 9]



OMNIBUS: Produktado de libroj, gazetoj kaj reklamiloj en esperanto, sveda kaj aliaj lingvoj; ankaŭ cirilaj literoj. Pli ol tri mil malsamaj litertipoj je dispono.

OMNIBUS · Box 135 · 135 23 Tyresö · Tel. 08-742 83 36 · Fakso 08-712 39 93